

Leterkesto, 4a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 432 1972.01.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por esprimi agrablan novan jaron al niaj geaŭdantoj ni lastfoje malfermas nian leterujon, en kiu nun troviĝas salutvortoj venintaj el 18 eŭropaj landoj : Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj Okcidenta kaj Orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Svedio kaj Svislando.

A.- Antaŭ ol legi erojn el interesaj dokumentoj ni salutas la restantajn personojn, kies nomojn ni ne citis dum la pasintaj elsendoj.

Cl.- En Germanio Okcidenta ni salutas sinjorojn Fredo Böhringer en Wannweil, Gerhard Kunze en Halden kaj Bruno Siegert en Bayern.

A.- En Germanio Orienta ni salutas sinjoron Ernst Kind en Grimma.

Cl.- En Hungario sinjoron Jozefo Rabi en Székesfehérvár.

A.- En Italio sinjoron Nicolino Rossi en Napoli.

Cl.- En Jugoslavio sinjoron Kálmán Kovacs en Novisad.

A.- En Nederlando sinjorinon Steffering en Leeuwarden kaj fraŭlinon Zwaaswijk-Dik en Alkmaar.

Cl.- En Pollando sinjoron Slawomir Sieja en Brzozow.

A.- En Svedio sinjoron Erik Swärd en Malmö.

En Svislando sinjorinon Lucienne Dovat en Renens, sinjorojn Ernst Glättli kaj Daniel Mühlemann en Brugg. Tiu lasta humure skribas:

A.- « *Pri la programo : Konsiderante Radion Varsovio la elsendoj [de la Svisa Radio] ŝajnas al mi tro mallongaj kaj malmultaj. Mi pensas, ke ankaŭ Svisujo kiel neŭtrala lando devus elsendi ĉiutagajn novaĵojn en la internacia lingvo, ekzemple je la 18-a horo, kiam oni nek laboras, nek dormas. Rabu iun novaĵparoliston kaj malliberigu lin en malsekan malhelan kelon, ĝis li konsentos fari tion.* »

Cl.- Sinjoro Daniel Mühlemann esprimas la vidpunkton de multaj geaŭdantoj, sed ni ne scias, ĉu ni kuraĝos plenumi lian konsilon. Verŝajne poste estus ni mem, kiuj restadus en malluma ejo !

A.- En Rumanio ni fine salutas sinjoron Asmarandei Guiu en Brasov.

Cl.- En Esperantio ni ne ankoraŭ solvis la problemon de la ortografiado de la propraj nomoj, kaj tio treege malfaciligas al ni la laboron. Tutcerte ni devos foje trovi mezan solvon al tiu tikla problemo. La metodo blinde konservi la naciajn ortografiojn ne taŭgas, tion ni tagon post tago konstatas. Tio eble taŭgas por la naciaj lingvoj, ĉar oni sin limigas al bone difinita teritorio. Sed en Esperantio la limoj ne plu ekzistas.

A.- En mezepoko oni kutimis latinigi la nomojn. Ekzemple Komenski fariĝis **Comenius**. La samon ni devus fari, kiam ni rilatas inter ni.

Cl.- Atendante tiun epokon ni alvokas niajn korespondantojn skribi ege legeble sian individuan nomon kaj familian nomon kaj substreki la familian nomon. Same la adreson ili tre legeble skribu. Kaj interkrampe, kial ne, ili povu doni proksimuman prononcadon de la familia nomo.

A.- Sinjoro Henry Palmer en Bristol, Britio, kiu gajnis la esperanto-konkurson de nia radio, grumblis pri duarangeco de esperanto en nia radio-programo. Ni legas liajn dirojn : « *Ni ĵus estas ricevintaj la programon de elsendoj por la venonta sezono. [...] Denove la lingvo estas apenaŭ uzata en la broŝuro. Kvankam mi komprenas, ke la Esperantistoj formas nur malplimulton el la aŭskultantaro kaj spaco en la broŝuro estas limigita, mi tamen opinias, ke nur antaŭjuĝo malhelpas vin uzi Esperanton.* » Tiun vidpunkton same esprimis pluraj geaŭdantoj. Eble ĝi estos foje aŭdata.

Cl.- Ĝis nun kaj eble ankoraŭ longe esperanto havas kaj havos treege malgrandan lokon en la vivo kultura de Svislando. Kiam tiu rolo kreskos, tiam aŭtomate la oficiala loko de la lingvo internacia kreskos. Ni akceligu tiun tagon per kunordigitaj agadoj.

A.- D-ro Hans Eichhorn, la vic-prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo entreprenis interesan enketon. Li dissendis 150 demandilojn al gejunuloj koncerne la praktikan uzon de esperanto kaj la aŭdadon de la radio-dissendadoj. El kelkaj landoj li ne ricevis respondon tre verŝajne, ĉar la demandiloj estis presajne dissenditaj, kaj ke ili simple ne atingis la celitojn. Sed el aliaj li ricevis sufiĉe multajn respondojn, por ke li povu fari kelkajn statistikojn.

Cl.- Li informiĝis pri la esperantiĝo de la respondintoj, kaj estas komike legi pri dujaraj esperantistoj. Sed fakte tiel estas. Oni povas esti 30-jaraĝa, sed nur dujara en la esperanto-praktikado.

A.- En la respondoj la granda plimulto opinias, ke ili havas sufiĉe ofte la okazon uzi esperanton praktike. Tio estas kuraĝiga respondo, kiu pruvas, ke la junuloj, kiuj volas praktiki esperanton, tion povas.

Cl.- Koncerne la radion 37 procentoj de la respondintoj neniam aŭskultis esperantan radio-programon ; 63 procentoj iam aŭskultis. El ili 24 procentoj hazarde, 27 procentoj intence, 12 procentoj plimalpli regule.

A.- Koncerne la aĝon de la esperantisteco, neniu en la grupo nul ĝis 3 jaroj aŭskultis regule. Tio pruvas, ke la radio-aŭskultantoj regulaj jam estas maturaj esperantistoj.

Cl.- En Esperantio ekzistas pli ol 2'000 esperantistaj grupoj. Estus foje interese pere de ilia kanalo fari diversajn enketojn pri esperanto, por havi sociologiajn informojn. TEJO montris la ekzemplon. Povu tiu ekzemplo trovi imitantojn kaj apogon. La Svisa Radio estos ĉiam preta informadi pri ĉiu bone planita enketo, por ke niaj aŭskultantoj povu aktive subteni ĝin.

A.- Vi aŭdis babiladon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !